## Redakcia noto

### Poŝtmarko omaĝe al Scienca Revuo

Aperis en Brazilo poŝtmarkoj, kiuj memorigas pri la 60-jaraĝa organo de nia Asocio (en 2006): ideo de s-ro *Pekim Tenorio* V*AZ*, fidela aŭtoro en Scienca Revuo (vd. SR 1/2010, p. 11-17): "Oni povas projekti (preskaŭ) iun ajn poŝtmarkon kaj la Poŝto eldonas ĝin. Mi decidis omaĝi Sciencan Revuon kaj iomete diskonigi Esperanton pere de tia rimedo".

La enskribo en la portugala (kiu troviĝas sur la poŝtmarko mem, sed por pli bona legado estas kopiita ankaŭ sub la poŝtmarkoj en la originala lingvo) tradukiĝas

*Periodaĵo en Esperanto*

*Scienca Revuo*

*(Eldonata en Germanujo)*
*Sciencaj temoj el tre diversaj kampoj*
*Ekde Marto/1949*
*4 kajeroj / jare*

La eldono kiel "*Carta Comercial*" (t.e. "komerca letero") signifas, ke ĝi validas nuntempe R$ 1,05. Tiu ĉi monsumo sufiĉas por pagi 20g-leteron ene de Brazilo. Se la prezo de la letero ŝanĝiĝos, la valoro de la poŝtmarko ŝanĝiĝos aŭtomate, tial oni skribas tekston kaj ne ciferojn. "*1° Porte*" signifas, ke la poŝtmarko povas pagi leteron, kiu pezas maksimume 20 gramojn. Se ĝi pezas pli, oni devas aldoni alian poŝtmarkon por kompletigi la kostojn.

La "vinjeto" (resp. "akompana poŝtmarko") estas deviga, kaj la Poŝto oferas pli aŭ mapli 15 "modelojn", unu el ili (la suba) havas la bildon de la brazila ŝtato *Tocantins* (=TO) kaj *Jalapao* estas naturparko de tiu ĉi ŝtato. La dua (supra) modelo esta la brazila flago (*Bandeira do Brasil*) kaj *Ipé* estas belega arbo de nia lando.

12 poŝtmarkoj (certe tre bele koloritaj) kostas pli aŭ malpli 14,50 eŭrojn. Oni devas mendi 12 aŭ dekduoblojn (12, 24, 36, ...). Por filatelistoj, mi povos mendi 12, 24, ...., de iu ajn el la poŝtmarkoj".

*Pekim T.* V*AZ*
<pekimtvaz@yahoo.com>



***Brasil 2007***
*Carta Comercial*
*1° Porto*
*Bandera Ipé*




*Revista em Esperanto*

*Scienca Revuo*

*(Editada na Alemanha)*
*Temas científicos das mais diversas áreas*
*Desde Março / 1949*
*4 edições /Ano*

***Brasil 2007***
*Carta Comercial*
*1° Porto*
*Jalapão - TO*




*Scienca Revuo*

*Revista em Esperanto*
*(Editada na Alemanha)*
*Temas científicos das mais diversas áreas*
*Desde Março / 1949*
*4 edições /Ano*